


KATALUNA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

numero 253 (20) - kvina epoko - decembro 1987

1887-1987
CENT ANYS
D'ESPERANTO

KONGRESA RAPORTO

sur paĝoj 3a kaj ceteraj.

nia junulara kant-kaj muziken-semblo riĉigis nian Artan Vesperon.



Sinjora Moŝto Joaquim Ferrer, kultura ministro de nia aŭtonoma registaro "Generalitat" alparolas la kongresanaron dum la sole na Malfermo en la Barcelona Universitato.

La ĉi-jara gajninto de la tri Floroj kaj per la Eglanterio de la Natura Floro, Timothy Brian Carr, legas siajn poemojn en la impona gotika salono "Consell de Cent" sub la prezido de sinjorina moŝto Maria Aurèlia Capmany, kultura konsilantino de la Barcelona Urbodomo.



FONDAĴOJ

ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO/KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO (Enregistrita far la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio je n-ro 5785), Apartat de Correus, 32318, 08080 Barcelona, Catalunya/Katalunio, telefonnumero (93) 716 36 33.

KOTIZOJ POR LA JARO 1988: Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32.000 p-toj; Kolektiva Membro 3200 p-toj.

BANKO: Caixa de Pensions "La Caixa". Agència 461. Pintor Vila Cinca, 08208 - Sabadell, Kontonumero 550-53.

PLENUMKOMITATO DE KEA: **Prezidanto:** Jordi Carbonell i Pinyol; **Vicprezidanto:** Maria Garcés i Coll; **Generala Sekretario:** Llibert Puig i Gandia, Apartat 290, tel. 716 36 33, 08200 Sabadell; **Kasisto:** Hèctor Alòs i Font; **Komitatoj:** Josep M^a Serrano, Josep Franquesa, Bartomeu Costa, Narcís Fluvià, Joan R. Guiñón, Girona Espero, E-Grupo "C.E. Puigcastellar".

KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich; Ricard Jordana; Òscar Puig.

KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:

PREZIDANTO: Gabriel Mora i Arana, Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden, Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Giorgio Silfer.

SEKRETARIO: Joan Ramon Guiñón i Roset.

JURIO POR LA 28aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ en la jaro 1988a PREZIDANTO: Gabriel Mora i Arana, Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Manuel Casanoves i Casals, Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz. **SEKRETARIO:** Joan Ramón Guiñón i Roset.

FLORLUDAJ MAJSTROJ: Clarence BICKNELL (3aj IFL, Olot, 1913), Artur DOMÉNECH i MAS (6aj IFL, Reus, 1916), Josep GRAU i CASAS (6aj IFL, Reus, 1916), Marian SOLÀ i MONTSERRAT (6aj IFL, Reus, 1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona, 1921), Jaume GRAU i CASAS (9aj IFL, Manresa, 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i La Geltrú, 1980), Giorgio SILFER (24aj IFL, Olot, 1984).

PEDAGOGIA KOMISIONO: Manel Marqués, Abel Montagut, Josep Tordera, Joan Torres, Lluís de Yzaguirre.

VORTARA KOMISIONO: **Sekretario:** Jordi Carbonell, Avda. del Paral·lel, 96-6è. Tel. 329 24 81 - 241 94 11, 08015 Barcelona.

KOLEKTIVAJ MEMBROJ: **Centre d'Esperanto Sabadell**, Apartat, 407, Papa Pius XI, 130. Tel. (93) 716 36 33, 08200 Sabadell; **Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo** St. Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); **Centre Excursionista Puigcastellar/Esperanto-Grupo**, St. Josep, 20, 08922 Sta. Coloma de Gramenet (Barcelonès); **Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto**, Mallorca, 207 - pral. Tel. (93) 253 95 07, 08036 Barcelona; **Esperanto-Fako "Institut de Batxillerat"**, Camí Reial València, 08860 Castelldefels (Baix Llobregat); **Esperanto-Fako "C.S. Joventut Terrassenca"**, St. Francesc, 52, 08221 Terrassa (Vallès Occidental); **Esperanto-Grupo Castelldefels**, A. Einstein, 1, 1.3, esc. B, 08860 Castelldefels (Baix Llobregat); **Esperanto-Grupo "Jozefo Anglés"**, Apartat 336, 08190 Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental); **Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal**, Dr. Zamenhof, 12, Tel. 899 30 03, 08739 Sant Pau d'Ordal. **Girona Espero**, Apartat, 509, 17080 Girona; **Hispana Esperanto-Fervojista Asocio ĉe Stacidomo Sans**, Barcelona.

KATALUNA ESPERANTISTO: **Eldonas:** Associació Catalana d'Esperanto/Kataluna Esperanto-Asocio, **Redakcio:** Hèctor Alòs, Joan R. Guiñón, Gabriel Mora i Arana, Llibert Puig. **Grafikisto:** Arnau Torras. **Anoncarlfo:** Tuta paĝo 10.000 ptoj; duona paĝo 5.500 p-toj; Kvarona paĝo 3.025; Okona paĝo 1.700; dekse-sona paĝo 950 p-toj. Presita ĉe: Gráf. El Tinell. Tel. 315 07 58 Barcelona. Dipòsit Legal: B-27 362-1982.

KOMARKAJ DELEGITOJ

Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i Roig. Sant Magí, 20. 3r. Tel. (93) 893 71 76 - 08800 - Vilanova i la Geltrú (Garraf).

Garrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda. Escola Llar, Ctra. de la Canya s/n. Tel. (972) 26 38 29 - 17800 - Olot (Garrotxa).

Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva: Girona Espero, Apartat - 509, 17080 - Girona (Gironès).

Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp: Josep M^a Serrano. Edifici Europa B-2-1 (St. Pere i St. Pau). Tel. (977) 21 89 41 - 43007 - Tarragona (Tarragonès).

Baix Ebre, Montsià: Josep M^a Altadill. Berenguer IV, 23. Tel. (977) 44 20 09 - 43500-Tortosa (Baix Ebre).

Catalunya Nord: Joan Fernández. 21 rue Henri Matisse. F-66000-Perpinyà (Rosselló).

| | | |
|---------------------|---------|-------|
| FONDAĴO JUBILEO | | |
| ĝis 31.07.87 | 9.000 | p-toj |
| Artur Gaya | 1.000 | " |
| FONDAĴO KOMPUTILO | | |
| ĝis 31.10.87 | 1.300 | " |
| FONDAĴO REVUO | | |
| ĝis 31.10.87 | 6.450 | " |
| "PREMIO PETRO NUEZ" | | |
| ĝis 31.08.87 | 191.000 | " |
| Ramon Roca | 4.000 | " |
| Núria G. | 3.000 | " |
| Maria Almagro | 1.000 | " |
| Miguel Gutiérrez | 1.000 | " |
| Ricard Jordana | 1.000 | " |
| Charles Deltell | 500 | " |
| Ángels del Pozo | 500 | " |
| Srs.Vilagran | 3.000 | " |
| Xavier Moretó | 500 | " |
| Pere Moretó | 500 | " |
| Llum Garcia | 500 | " |
| Familia Carbonell | 5.000 | " |
| Xavier Margais | 500 | " |
| Narcís Fluvià | 500 | " |
| Arnau Torras | 250 | " |
| Albert Garriga | 600 | " |
| Lluís Pi | 1.000 | " |
| Carme Llapart | 1.000 | " |
| Martí Aguado | 1.000 | " |
| GET | 650 | " |
| Roser Perissé | 500 | " |

TUTKORE NI DANKAS ĈIUJN DONACINTOJN:

SUDOKCIDENT-EŬROPA ORGANIZ-PEDAGOGIA KONFERENCO 05-08 Decembro 1987 en BARCELONO

Se vi estas grupaktivulo aŭ vi celas fariĝi tia, ne maltrafu la okazon lerni la plej modernajn metodojn por informado, instruado kaj aplikado de la lingvo sub la kompetenta gvido de prestiĝaj kulturhomoj esperantistaj internacinivelaj.

Ĝis la lasta momento eblas aliĝi telefone 716.3633 -20-22 h. ĉiu-vespere-eĉ en la kunveno mem -Unesko, Mallorca, 207-pral.-sabate la 5an decembro ĝis la 10a h. matene tuj antaŭ la komenco de la Konferenco.

23a KATALUNA KONGRESO DE
ESPERANTO: LA KVALITA KONGRESO

La raportoj sur la paĝoj de nia revuo ĉiam postulas koncizon ĉar ni daŭre baraktas pro spacomanko malgraŭ tio ke dum la Jubilea Jaro ni sukcesis elteni regulan dumonatan aperadon de nia organo.

Pri raportoj oni emas kaj statistiki kaj epiteti kaj ni ankaŭ cedas al tiu facila tento. Pri la epiteto vi legis ĝin titole kaj pri statistikoj jen resume la plej elstaraj:

- entute 215 gekongresanoj-nombro kiu tamen ne sukcesis superi tiun de la 21a Kongreso en S. Cugat.
- rekordo tamen pri donacoj kiuj superis la 30.000 p-tojn, ja ege necesaj por eviti novan deficiiton. Dankan aplaŭdon por la malavaraj donacintoj.
- plej minimuma Organiza Komitato
- malpli da bankedanoj ol kutime.

La kvaliton ni ne troe distrumpetas kaj ĉi-sekvaj pravigoj verŝajne konvinkos la ne partoprenintojn, ĉar ja la gekongresanoj mem konvinkiĝis per rekta partopreno.

unua-La solena Malfermo okazis en la Barcelona Universitato sub la patroneco kaj sincera kunlaboro de la doĵeno de la Filologia Fakultato d-ro Ramon Pla, kiu prezidis kune kun la Kulturministro de nia aŭtonoma registaro s-ra Moŝto Joaquim Ferrer, la vicrektoro d-ro Jacint Corbella, d-ro Antoni Grau, nome de la Organiza Komitato kaj Llibert Puig, prezidanto de nia Asocio.

Sub la gvido de la juna sabadella grupprezidanto Oscar Puig, kiu prezentis la solenaĵon, intervenis unualoke Joan R. Guiñón per legado de la salutmesaĝo de Giorgio Silfer, prezidanto de Literatura Foiro-Kooperativo (kiun ni aparte publikigas), sekvis Antoni Grau per bonvenigaj kaj dankaj vortoj kaj la vicrektoro d-ro Corbella per entuziasmiga parolado kaj formala promeso faciligi la enkondukon de Esperanto en la Universitato (intertempe tiu promeso realiĝis kaj kun ĝojo ni povas anonci ke ĉi-novembre eksperimentaj kursoj komenci

ĝas, pri kio ni danke gratulas la simpatian vicrektoron pro lia sincera apogo al nia afero. Pli vaste ni informos en venonta revuo).

Sekvis la interveno de Llibert Puig kiu instigis al plua laborado dum la dua jarcento kaj laste parolis la Kulturministro kiu alportis la personan reprezenton de la prezidanto de la "Generalitat", kiu tre elokvente kaj simpatie manifestiĝis pri la kultura kaj humanisma rolo de la esperantismo kaj pledis por ke ni defendu tamen nian katalunan identecon. Nome de la eksterlandaj gastoj parolis Claude Gacond dua-Unuafoje aperas en la kongreslibro salutmesaĝoj de altrangaj aŭtoritatuloj: Tre Honorindaj Jordi Pujol, prezidanto de la "Generalitat" kaj Miquel Coll, prezidanto de la Kataluna Parlamento kaj de s-ra Moŝto Josep Ma. Bricall, rektoro de la Barcelona Universitato. Aparte menciindas la oficiala foto de nia registara prezidanto kun speciala dediĉo por nia Kongreso, kiun ni aperigis en la frontpaĝo de nia lasta revuo, kiun la gekongresanoj ricevis kun la kongresaj dokumentoj. tria-Se kutime la ceremonio de niaj Internaciaj Floraj Ludoj estas solena kaj certe unika, la ĉi-jara 27a estis speciale brila pro la eksterordinara beleco de la urbodoma gotika salono "Consell de Cent" kiun la loka urbestraro ĝentile disponigis al ni. La prezido fare de la kulturkonsilantino Ma. Aurèlia Capmany, renomata kataluna verkistino, la ĉeesto de la gajninto de la tri floroj kaj tial de la Natura Floro, kiu mem legis siajn premiitajn poemojn kaj la ege interesa festparolado de Georges Lagrange, aldonis al la ceremonio prestiĝajn trajtojn, kiuj sendube fariĝos precedencaj por la pozitiva evoluo de nia literatura konkurso.



Sed la ĉi-jara ceremonio ankoraŭ fariĝis pli majesta per la proklamo de Bernard Golden kaj Giorgio Silfer kiel Florludajn Majstrojn kaj livero de memoriga medalo al ties reprezentantoj (Angels del Pozo kaj Maria Garcés) ĉar la honoritoj ne povis ĉeesti. Kaj ankaŭ per la kortuŝa livero de artaj diplomoj nome de Patronaro Petro Nuez al niaj karaj veteranoj Josep Alberich, Tomàs Alberich kaj Miquel Vilagran pro ilia multjara aktivado en la movado.

(Aparte legu la verdikton kaj la ceterajn dokumentojn, t.e. la sekretarian prelegon kaj la festparoladon)

kvara-La Universitata Prelegserio elstaris sendiskute pro la kvalito de la prelegantoj: akademiano d-ro John C. Wells, Claude Gacond kaj Ludoviko de Yzaguirre.

Ni ne forgesas la belegan koncerton de nia ankoraŭ sennoma ensemblo kies ĉefaj roluloj Pep kaj Xavi mirigis kaj entuziasmigis nin per brila premiero, nek la interesajn intervenojn de Claude Gacond, kies pedagogia sperto kontentigis la multnombran ĉeestantaron.

Pri la kongresa temo, verŝajne ni trafis la ĝisnunan plej efikan agadmanieron per prezento de referaĵoj kun tuj posta debato, tamen ankoraŭ malmultaj en tiu ĉi unua eksperimenta okazo. Espere-

ble ili abundos estonte kaj ni atingos la deziratan celon partoprenigi la homojn kaj eltiri el iliaj intervenoj la plej sekvindajn sugestojn.

Pri la kongresa temo ni revenos en venonta revuo kaj pri ceteraj kongresaj programeroj ni ankaŭ raportos.

Pri la Eksterordinara Asembleo aparte ni raportas.

La Asocio tutkore gratulas la Organizan Komitaton kaj speciale ties gvidantaron Gemma Armadans.

ASEMBLEO

La Eksterordinara Asembleo estis ja granda sukceso de la Kongreso. Mirinda partoprenantaro plenplenigis la salonon Nuez, kie okazis la diskutoj. Dekdu-paĝa broŝuro pri la debatotaj temoj estis disdonata kune kun la kongresaj dokumentoj, kaj entute dek punktoj listiĝis en la definitiva tagordo.

Ege ampleksa estis la sekretaria raporto pri la agado de la Asocio dum la Jubilea Jaro, kiu estis unuanime akceptita.

La statutmodifoj formis la kernon de la diskutpunktoj de la Asembleo kaj la debato foje eksterordinare vigliĝis. La ĉefaj celoj de la modifoj estas plialtigi la partoprenon de la aliĝintaj grupoj nome en la Plenumkomitato kaj Asembleo, kaj de la membroj en la Asembleo per ties okazigo dum la kongreso. Oni akceptis ankaŭ la ŝanĝon de labormaniero de la Plenumkomitato al tio, ke ĝi principe kunvenu ĉiun trian monaton, por faciligi la engaĝigon de neĉirkaŭ barcelonaj aktivuloj. Krome, la oficperiodo de la plenumkomitatoj estis fiksita al tri jaroj kaj du por la Kontrola Komisiono. Oni aprobis ankaŭ aldoni al la asemblea tagordo la fiksadon de sekvantjara laborplano; la donacon de la asociaj havaĵoj okaze de malfondo de la Asocio kaj nur se la malfonda asembleo ne decidus alion al Literatura Foiro-Kooperativo; kaj la neelekteblecon por la gvidorganoj de la Asocio de gvidorgananoj de aliaj landaj asocioj.

Sen halto, la Asembleo unuanime aprobis novan estraron, kie elstaras la nova Prezidanto Jordi Carbonell i Pinyol.

Sekve kaj unuafoje estis pritraktita propono de agado por la sekva jaro, kiu unuanime aprobiĝis. Kaj same aprobiĝis ege detale prezentita budĝeto por 1988. Fine reprezentantoj de Kataluna E-Junularo informis, ke ĝi malfondiĝis kiel Faka Sekcio de KEA kaj okazis fondkunveno de nova KEJ kiel laŭleĝa asocio, cele al efektivigo de la unuanima akcepto de la Komitato de TEJO de KEJ kiel ties Landa Sekcio en Katalunio. Aliflanke Yzaguirre prezentis la fondaĵon por la pedagogia premio "Petro Nuez".



27aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

VERDIKTO



NATURA FLORO KAJ
EGLANTERIO:

"Simfonio verda"
de Timothy Brian Carr (Britujo)

ROZO:

"La orhara junulino"
de Timothy Brian Carr

VILO:

"Teologio"
de Timothy Brian Carr

HONORA MENCIO:

"Neŭtraleco"
de Julius Balbin (Usono)

PREMIO "FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS": ne aljuĝita



PREMIO "JAUME GRAU I CASAS" : ne aljuĝita

PREMIO "ARTUR DOMÈNECH I MAS" : ne aljuĝita

Barcelona la 11an de oktobro 1987a

Gabriel Mora i Arana
prezidanto

Joan Ramon Guiñón i Roset
sekretario





27aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ
SEKRETARIA PRELEGO (Joan Ramon Guiñón i Roset)

Il.lustríssima Senyora Maria Aurèlia Capmany
Estraranoj de Kataluna Esperanto-Asocio
Membroj de la Kongresa Komitato
Florludaj Konservantoj
Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

Hodiaŭ, la glora kaj historioplena Salono de la Cent Konsilantoj, kiu simbolas la urban liberecon kaj demokration, estas plenĝoja. La nesto de la katalunlingvaj Floraj Ludoj honorigas Esperanton en la Jubilea Jaro, gastigante nian Beletran Feston internacian. Ĉiuj difinoj de la Festo, kiu nun kunigas nin ĉi tie, fontas el civilizacia korteza ideo. La Floraj Ludoj florantaj sub la protekto de la mezepokaj "Amaj Kortegoj" montras al ni la idealon de homaj respekto kaj toleremo. Kulturo valoras, se ĝi nur plene respektas Homaron kaj Infanon, Oldulon kaj Floron kaj Birdon kaj ĉiujn kreitaĵojn. Tia estas la devizo de la Konservantaro: "Homeco, Paco, Amo!" Nia trobadora Festo estas klera, akademia kaj iasence artefarita. Tion ja sciis en 1859 Joan Cortada, Victor Balaquer, Manuel Milà i Fontanals, Joaquim Rubiò i Ors, Josep Lluís Pons, Miquel Victorià Amer kaj Antoni Bofarull, kiuj restarigis ĝin laŭ modelo mezepoka por instigi la junularon al katalunlingva verkado. Tion ja sciis la pioniroj-profesoro Delfí Dalmau kaj Frederic Pujulà i Vallès kaj aliaj-enkondukante tiun ĉi beletran konkurson en la 5an Universalan Kongreson en la jaro 1909. Ili provizis la esperantan ponolon per rimedo ebliganta la pluan evoluon de nia lingvo. Kiel tiam diris al ili Carlo Bourlet: "Vi donis al ni, hodiaŭ en Barcelono, la plej valoran signon de via estimo por Esperanto... Vi komprenis ke Esperanto estas nun lingvo vere vivanta... kun naskiĝanta literaturo."

Jaroj da gloro nasis por la esperanta literaturo kaj por la Beletra Internacia Konkurso. Sed sekvis longa nigrenuba nokto por Katalunio. Finfine, antaŭ dek jaroj, nova aŭroro kaj espero kuraĝigis aliajn pionirojn restarigi sub la aŭspicioj de Kataluna Esperanto-Asocio la iamajn glorajn Internaciajn Florajn Ludojn. Tion farante, ili-eble senkonsciepensis pri jenaj vortoj de Zamenhof al Antoni Koffman: "Se eĉ ĉiuj akademioj de la mondo akceptus Esperanton, se eĉ milionoj da personoj ĝin uzadus-nenio garantias, ke en la daŭro de unu jaro ĝi subite ne estos forĵetita kaj forgesita por eterne! Se ĝi unu fojon "eliros el la mondo", ĝi plej rapide pereos por ĉiam. Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiuj akcentus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popolo havos vivon multege pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj".

Ja ni kredas ke per Esperanto oni povas fari originalan beletran literaturon, ĉar ni kredas ke Esperanto estas vivanta lingvo de vivanta diaspora popolo. Ni estas kiel Franz Kafka, judo kaj germanlingva en kunteksto kristana kaj ĉeĥa: duoble minoritataj, tiel ni katalunaj esperantistoj.

Mi prunteprenas vortojn de la Florluda Mastro Giorgio Silfer: "La rolo de la esperanta verkisto estas samtempe tiu de la kosmopolito kaj de la individuisto, partoprena en la opa unuo kaj en la tuta mondo. Esti rivero, tial ke ondo". Kaj li daŭrigas plue: "La unua celo de la esperanto-verkisto estas kontribui al la kvalita kresko de la transnacia socio al kiu li decidis aparteni: kio signifas legi pli multe, studi pli multe, vojaĝi pli multe, kaj paroli pli multe en Esperanto, se la celo estos krei novan kulturon." La Internaciaj Floraj Ludoj prainspiriigas de la "Manifesto de Raŭmo": La Festo aplikas Esperanton kaj emfazas la fakton ke la Internacia Lingvo fariĝos rimarkinda fenomeno komunika nur post kiam ĝi ekestos ankaŭ kiel kulturlingvo. En tia perspektivo ni akadas en la sama linio de Gresiljono, Kultura Centro Esperantista, La Kvinpetalo, Literatura Foiro, kio kie la lingvo estas aplikata en la diversaj branĉoj de la homa scio. Estas mia devo plezura, nome de la Konservantaro, danki tiujn personojn kiuj helpe subtenas kaj ebligas la celebradon de nia Trobadora Festo: dankon al la Sinjorino Moŝto Maria Aurèlia Capmany, kiu tiel afable disponigas al ni tiun imponan kaj historian Salonon



kaj kiu honorigas nin ĉiujn pere de sia ĉeesto; specialan dankon al la estraro de Kataluna Esperanto-Asocio kaj al la Loka Kongresa Komitato: sen ilia helpo kaj lullaboro la tasko de la Konservantaro estus neebla; dankon ankaŭ al la Kooperativo de Literatura Foiro, kiu de longe daŭre diskonigas nian Feston; elkoran dankon al vi, estimataj sinjorinoj kaj karaj sinjoroj, pro via afabla ĉeesto; kaj fine sed ne laste, tre elkoran dankon al sinjorino Maria Garcés, kiu tiel sindone kaj arte pretiĝis la Diplomojn.


Kiam en la jaro 1859 oni restarigis la katalunlingvajn Florajn Ludojn, tiam oni decidis ke tiuj verkistoj kiuj gajnos tri premiojn estu honore proklamitaj Florludaj Majstroj.

Tiun belan tradicion la Internaciaj Floraj Ludoj tuj alproprigis al si ekde la komenco. Clarence Bicknell, Josep Grau i Casas, Artur Domènech i Mas, Marian Solà i Montserrat, Josep Ventura i Freixas kaj Jaume Grau i Casas estis proklamitaj Florludaj Majstroj en la epoko antaŭmilita.

Hodiaŭ la Konservantaro proklamas la honoran Florludan Majstrecon de Bernard Golden kaj de Giorgio Silber. Ili ambaŭ ricevos atestatan Medalon.

Bedaŭrinde, pro privataj cirkonstancoj, ili ne povis vojaĝi Barcelonen.

Nome de Majstro Bernard Golden ricevos la Medalon sinjorino Angels del Pozo kaj nome de Majstro Giorgio Silber ricevos la Medalon sinjorino Maria Garcés.



S A L U T M E S A Ĝ O DE LA
PREZIDANTO DE KOOP-L-F,
G I O R G I O S I L F E R,
POR LA 23a KATALUNA KONGRESO.

Estimata Prezidanto,

Karaj geamikoj,

Barcelono gastigas dum ĉi tiuj tagoj la ĉefan kongreson de la kataluna esperantistaro dum la jubilea jaro. Temas pri evidenta agnosko pri la rolo de ĉi tiu urbo en la historio de la Esperanto-fenomeno.

La urbo de la Internaciaj Floraj Ludoj, de Frederic Pujulà i Vallés, de la unua humura periodo en la internacia lingvo... La urbo kie la parizano Carlo Bourlet, fondinto de "La Revuo, organo de la esperanta inteligenteco antaŭ la unua mondmilito, en 1909 dankis la lokajn aŭtoritatojn per jenaj vortoj: "Vi donis al ni, hodiaŭ en Barcelono, la plej valoran signon de via estimo por Esperanto. Vi komprenis ke Esperanto estas nun lingvo vere vivanta, kun naskiĝanta literaturo".

Barcelono estis, en tiuj jaroj, vera laboratorio por la eŭropa civilizo. Ne hazarde, la protagonisto de la romano "El amor en los tiempos del cólera", de Gabriel García Márquez, mencias nur unu urbon kiel modelon al kiu inspiri la modernigon de sia kariba havenurbo. Doktoro Juvenal Urbino fakte volas, "ke oni konstruu ŝirmitan bazaron, kun vitraj kupoloj, kiel tiuj de li viditaj en la antikvaj grandaj bazaroj sur la "Rambles" de Barcelono, kie la provizoj estis tiom riĉaj kaj puraj, ke estis preskaŭ domaĝe ilin manĝi".

En ĉi tiu vasta ĉefverko en la kastilia lingvo, Barcelono reliefas kiel unika gemo, kiel kataluna diamanto en hispana oro.

Esperanto rekte partoprenis la kulturan vivon de Barcelono en tiuj jaroj. Nia komunumo estis rekte envolvita en la fermento de la epoko, kaj eĉ la Universala Kongreso de 1909 riskis ne okazi, pro la sangaj eventoj de tiu jaro, kiam en tumultoj mortis barcelonaj laboristoj, inter ili ankaŭ esperantistoj.

Fine la kongreso okazis, kaj estis granda festo; sed Lazaro Ludoviko Zamenhof sekrete omaĝis al la suferoj de la momento, rezignante pri sia origina festparolado. Efektive, la alparolo de Zamenhof en Barcelono 1909a estas la plej mallonga el la kongresaj paroladoj de la iniciatinto de Esperanto, kaj certagrade la malplej signifa, kun frazoj kiel:

"En la ĝisnunaj kongresoj mi havis ion por diri al vi, tial ĉe la malfermo de la kongreso mi parolis longe; hodiaŭ mi havas nenion gravan por diri, tial mi parolos mallonge".

El tiu sama jaro mi volus memorigi al vi multe pli elokventan epizodon.

La novaĵo de Esperanto tiklis la atenton de dudekjara laboristo, kiu subite aperis ĉe vespera kurso, dum agrabla printempa horo. Li estis inteligenta junulo, sed analfabeta, kiel multaj malriĉuloj en niaj mediteraneaj landoj tiutempe. La instruisto kaj la samklasanoj, en la Esperanto-kurso, helpis lin tiom, ke li alfabetiĝis tra la lingvo de Zamenhof! Kaj dum sia longa, pres-

kaŭ centjara vivo, samideano Ricard Sans ĉiam atestis la superecon de la esperanta ortografio, kompare al la kataluna kaj la kastilia, kun kiuj poste, multe pli pene, likonfrontiĝis.

Jen, karaj geamikoj, sur la flagoj de la kataluna Esperantio meritas flirti ankaŭ ĉi tiu nomo: Ricard Sans.

Por Ricard Sans Esperanto ne estis celo, sed rimedo tra kiu li atingis la plej altan celon, sian propran "revolucion de la kvalito", se uzi la vortojn de la hungara poeto László Németh. Tiu "revolucio de la kvalito" kiu montras la esencon de la esperantisteco: renaskiĝo kiel nova homo: kaj kataluna kaj transnacia.

La dua jarcento de Esperanto, kiu por Katalunio malfermiĝas hodiaŭ, per ĉi tiu kongreso, devos alporti al nia tuta komunumo tiun "revolucion de la kvalito" kiu jam triumfis en la animo de pluraj, ekzemple de Ricard Sans. De individua Konscio al kolektiva konscio pri ĉi tiu neceso: jen la historia signifo de la Manifesto de Raŭmo (1980), laŭ la vortoj de nia kara amiko Jerzy Leyk (Jeŝi Lejk), kiu prezidis Polan Esperanto-Asocion de 1981 ĝis 1985.


La malfacilaĵoj kiuj trafis nian amikon Leyk en sia lando, kaj portis al la likvido de la nova kurso en la pola Esperanto-komunumo, devas atentigi nin pri la rifoj inter kiuj navigos la kataluna vojo al raŭmismo, tio estas al moderna esperantismo.

Per sia aliĝo kiel kolektiva membro al la kooperativo de Literatura Foiro, Kataluna E-Asocio elektis vojon sur internacia nivelo: la vojo kiu kondukas ne al centralisma, piramida hierarkio, sed al konfederacia formulo, kie ĉiuj societoj konservas kaj disvolvas sian aŭtonomion, kaj samtempe ĝuas kulturajn servojn kiujn LF-koop (kaj aliaj realaĵoj) libere provizas al libera kultura komunumo, de Italio ĝis Finnlando, de Svedio ĝis Katalunio, en cirkvito kies polusoj estas la "etaĵoj" de la esperantlingva diasporo: Gastejo Edmond Privat, Kastelo Greziljono kaj la Kvinpretalo, internacia staĝejo de LF-koop, kies kursoj estas ankaŭ je dispono de KEA.

Por pluri la katalunan vojon en la dua jarcento de Esperanto, ni sentis la bezonon pri momento de medito kaj preparo, ankoraŭ en Barcelono, ĉiukaze sur la kataluna tero. Tial, komence de decembro de ĉi tiu jaro, KEA kaj LF-koop aranĝos la Sud-Okcident-Eŭropan Organizan Konferencon, al kiu ĉiuj dezirantaj aktivaj per kaj por Esperanto estas bonvenaj. La programo estas je via dispono dum ĉi tiu kongreso.

La fakto, ke mi esperas revidi multajn el vi ĝuste okaze de tiu organiza konferenco, mildigas la bedaŭron pro la neĉeesto en via hodiaŭa kongreso, al kiu mi deziras plenan sukceson.

FESTPAROLADO DE
G E O R G E S
L A G R A N G E
POR LA 27aj I.F.L.



Sinjorina Moŝto!
Sinjoro Prezidanto!
Karaj geamikoj!

Estas por mi granda ĝojo kaj granda honoro, ke vi invitis min por tiuj Floraj Ludoj, kiuj estas ankaŭ la jubileo de Esperanto.

Granda ĝojo, ĉar mi unuan fojon estas en Barcelono.

Fakte mi ne estas el tiuj esperantistoj, kiuj emas migradi tra la tuta mondo. Mi tamen iom vojaĝis, sed la Pireneojn mi unuafoje transiras. Kial?

Ĉu decas, en tiel impona salonego menciigi proprajn memoraĵojn? Mi tamen kuraĝos.

Katalunio estis por mi temo de revo kaj eble ankaŭ iom de kulposento. Unuafoje mi aŭdis tiun vorton, mi estis nur infano kaj tio estis la diklitera titolo de gazeto: "L'agonie de la Catalogne"

Agonio de Katalunio?...tio en Esperanto terure rimas. Estis, se mi iom klare memoras en 1938a aŭ 39a...Tempoj forgesotaj kaj forgesendaj. Mi estis infano kaj ne bone komprenis, kio okazas, mi komprenis nur, ke okazas io terura.

Kaj tiu teruraĵo ankaŭ min trafis, apenaŭ du jarojn poste, pli norde, en Francio: la milito.

Post la milito, jam juna esperantisto, mi foje renkontis kelkajn el tiuj rifuĝintojn el Hispanio, pli ofte el Katalunio mem, kiuj ankoraŭ portis en siaj magraj pakaĵoj de venkitoj, la amarecon de perdita revo: jes en '36a en Katalunio, same kiel en Parizo en 1871a, oni revis pri mondo pli justa, pri mondo de justeco en libereco.

Kaj same kiel en Parizo en 1871a, tio dronis en sango.

Barcelono, tio estas ankaŭ tiu Ciutat cremada, kie Zamenhof en 1909a devis rezigni la preparitan paroladon, ĉar ĝuste, antaŭ nelonge, okazis tie sanga striko...

Jes do, Katalunio estis por mi junulo ia revo, kiun oni ne kuraĝas tuŝi...

Kompreneble post la milito kaj ĉefe en la jaroj 60-aj, milionoj da Francoj venis al Katalunio. Sed simple por gustumi la malplikostan sunon de la "Costa Brava". Mi konfesas, ke tio ne multe logis min. Tiom pli ke ankoraŭ staris "la Paliso". Kaj mi ne emis rigardi ĝin tro proksime.

Ciel en '47a -jes antaŭ kvardek jaroj, ĝuste la jaron kiam mortis Lanti- mi iĝis esperantisto, kaj aniĝis al SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Preskaŭ hazarde, nur tiun adreson mi posedis.

Sed la ideoj de Lanti tuj ŝajnis al mi ĝustaj, justaj kaj logikaj:

La provincaj lingvoj, la dialektoj malaperis aŭ estas forsventantaj antaŭ la naciaj lingvoj. Kaj la naciaj lingvoj malaperu antaŭ la mondlingvo: unu homaro, unu lingvo. Ĉio alia, nur bagatelo, nur detaloj.

Nu, mi estis franclingvano el la pariza regiono por kiu la problemoj de la lingvaj minoritatoj estas tute fremdaj. Nur jarojn poste mi komprenis, ke unu el la aspektoj -paradoksaj- de la sennaciismo de Lanti estas ĝuste la franca, tipe franca, jakobenisma centralismo: la centralismo, kiu forigas la diferencojn.

Nur jarojn poste mi komprenis tion. Tra mia esperantisteco.

Jes, mi naskiĝis apud Parizo. Tial mia gepatra lingvo, mia hejma lingvo estis la franca, ne iu dialekto, ne iu el tiuj marginaj lingvoj, kiujn Parizano emas ignori. La franca, t.e. ne ekzakte la lingvo de Voltaire aŭ de Victor Hugo, sed tiu komun-uza lingvo, kiu notinde distanciĝas de la literatura.

Mi do estas franclingvano. Mi nek fieras nek hontas pro tio. Tio estas nur la hazardo de la naskiĝloko. Sed tio tre gravas por la formiĝo de mia mondkoncepto.

Kaj krome mi naskiĝis en la "tria Respubliko", tiu respubliko, kiu disfalis antaŭ la naziaj tankoj en 1940a.

Kaj oni instruis al ni, ke la Respubliko estas unueca kaj nedividebla kaj ke ĝia sola lingvo estas la franca. Tial ŝajnis al mi evidente, kaj tute ne diskutinde, ke ĉiuj ankoraŭ ekzistantaj dialektoj, ke la aliaj marginaj lingvoj de la franca teritorio nature kaj nepre devas malaperi.

Tio estis evidentajo por miaj dek aŭ dekdu jaroj.

Ke la Korsikanoj parolis italan dialekton, la Alzacanoj germanan, ke estis Flandroj, Katalunoj aŭ Vaskoj, ke estis Bretonoj kun kelta lingvo, Bretonoj, kiuj eĉ ne komprenis la francan, sed kiujn oni amase sendis kontraŭ la germanajn mitralojn dum la unua mondmilito, ke en la sudo oni parolis tute aliajn idiomojn...nur bagateloj. Nu, la lingvajn minoritatojn oni simple ignoris, nome de la Respubliko unueca kaj nedividebla.

Jes oni trudis al ni tutpretajn konceptojn, fakte, antaŭjuĝojn, kiuj, tial ke ni estas infanoj, ŝajnas al ni evidentaj.

Infanaĵoj antaŭjuĝoj? Jes. Sed ni vidas, ke en la lasta kongreso de la PEN-klubo, en majo '87, iu eminenta stultulo publike deklaris, ke estas ridinde verki en la kataluna! (I)

Nur tra mia esperantisteco -kaj mi jam estis kvardekjarami komprenis la profundan signifon de tiu subpremado al la lingvaj minoritatoj.

Piednotoj: (rimarkoj ne diritaj dum la prelego)

1- Vidu en "Literatura Foiro" la artikolon de Perla Martinelli; p.5a, unua kolono. (kajero N°105)



Se vin interesas la kompleta festparolado de Georges Lagrange, kajerforme kaj bele ilustrita en sama grandeco kiel ĉi tiu provpaĝo sed tamen en normala litertipo, mendu unu aŭ pluraj ekzempleroj po 100 pesetoj kaj kunsendu ĉekon pri la totalo de via mendo.